

la Espero


LA ESPERO
SVENSKA
ESPERANTOTIDNINGEN
MARS 1977

FONDITA EN 1913
ISSN 0014 0694

2



Espe
urligt!
h så förhå



Ge La Espero som gåva!

Tycker du att *La Espero* är en bra tidning? Du kanske t o m tycker att fler borde läsa den?

Styrelsen i SEF har diskuterat hur man skulle kunna få en större spridning och valt att på prov införa en rabatterad avgift för gåvoprenumerationer. Fr o m mars gäller priset 20 kr per gåvoprenumeration och år; en rabatt på 33%.

Vilka kan man ge en gåvoprenumeration till? Eftersom tidningen är tvåspråkig kan du dels ge den till dina svenska bekanta, dels till dina bekanta utomlands som kan esperanto. Och, varför inte?, prenumerera olika väntesalar på *La Espero*. *Esperantonytt* finns redan på många av dem — *La Espero* skulle vara en bra komplettering.

Examensdag: 24 april i år

Vill du kolla dina kunskaper i esperanto och få ett intyg om att du kan det? Delta i en examen! Svenska Esperanto-Institutet meddelar, att högre och lägre examen i esperanto anordnas söndagen den 24 april. För vidare upplysningar kontakta Märtha Andréasson, 2265 Tollerød, 425 90 Hisings Kärra.

Hugo Löfgren 80-jara

Nur nun ni eksciis, ke Hugo Löfgren el Avesta fariĝis 80-jara la 15-an de januaro.

Hugo Löfgren havas grandan intereson pri lingvaj problemoj, kaj li tradukis en esperanton tutan aron da popularsciencaj artikoloj; kelkajn li eĉ verkis. Iujn el ili ni publikigis en *La Espero*, sed ĉe la redaktoro restas granda kolekto por kiu ni ĝis nun ne trovis lokon.

Ni postfeste kore gratulas al la vigla jubileanto.

Kom ihåg 20 mars!

Den 20 mars är ett viktigt datum. Då ska förslag till Esperantoförbundets årsmöte vara inlämnade till styrelsen. Förslagen (motioner) ska behandlas av styrelsen vid ett möte i slutet av mars, och styrelsen ska ge ett utlåtande. I mitten av april skrivs de ut på stencil och sänds till föreningar och ombud.

Den 20 mars ska också alla uppgifter till förbundets årsrap-

JES & NE

port ha kommit in. Det brukar finnas ett särskilt avsnitt i rapporten för klubbarnas verksamhet.

En styrelsemedlem i varje esperantoförening har fått *Klubbinfo* med anvisningar om hur motionerna lämnas in och en blankett för uppgifter till årsrapporten.

I *Klubbinfo* finns dessutom en bunt andra blanketter. Esperantoförbundet behöver varje år aktuella uppgifter om vem som är ordförande mm i föreningarna. Dessa uppgifter behövs också i slutet av mars.

Donu helpon al Gustavo

Gustavo estas esperantisto en Ĉilio. Nur iom pli ol 30 jara instruisto li jam dum du jaroj devas kaŝi sin pro politika persekutado. La lastan jaron li trovis rifuĝon en alilanda ambasadejo en Santiago.

Gustavo havas edzinon kaj du etajn infanojn, kiujn li ne renkontis dum du jaroj. Ne estas strange, ke li deziras vivi normalan vivon, kune kun sia familio. Li povas fari tion en Svedio, sed li bezonas helpon.

Grupo da stokholmaj esperantistoj decidis helpi pagi la flugvojaĝon de Gustavo de Santiago ĝis Arlanda. Kiel vi komprenas, temas pri multe da mono, speciale se oni sukcesos venigi la tutan familion.

Ĉu vi havas eblecon helpi al tiu ĉi juna homo al digna vivo? Se jes, bonvolu pagi kiom ajn vi povas al pĝ. 71 06 88 - 3, al Fr. Luin, kiu plupagos la monon al la organizo, kiu aranĝos la formalajojn por helpi lin. Skribu «Por Gustavo» sur la pagilo.

Ett nytt specialnummer i höst

Kommer du ihåg specialnumret av *Esperantonytt* som kom ut hösten 1975? I höst kommer det ett nytt specialnummer. Det kommer att ha samma format (som kvällstidningarna) och det kommer att tryckas i stor uppla-



**Ĉu vi estas juna esperantisto?
Ĉu vi jus lernis esperanton?
Ĉu vi volas vojaĝi al esperanto-aranĝo?**

**Esperantostiftelsen donos stipendion al
juna esperantisto, kiu deziras vojaĝi al
esperanto-aranĝo eksterlande.**

La stipendio estas je 300 kronoj.

**Skribu mallonge pri vi mem, via aĝo,
kiam vi eklernis esperanton, kaj en kiu
aranĝo vi volas partopreni.**

**Sendu la leteron al Esperantostiftelsen,
Fack, 122 04 Stockholm-Enskede, plej
laste la 15-an de aprilo 1977.**

ga: 1975 års upplaga trycktes i 52 000 exemplar. Vi hoppas att minst lika många behövs i år för information om esperanto inför höstens kursstart.

Innehållet i detta specialnummer blir helt nytt. Det kommer att finnas artiklar om esperantos 90-års jubileum, om esperantos kultur, vilken roll esperanto har i internationella kontakter osv.

Esperantoförbundet vill veta i god tid hur många exemplar av tidningen din klubb vill beställa. Din förening har redan fått en beställningsblankett — ta därför upp frågan om höstens information redan på nästa föreningsmöte. Och planera redan nu hur ni ska lägga upp höstens informationskampanj.



La Espero

Organ för Svenska Esperantoförbundet

Adress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Ansv. utgivare: Bertil Åkerberg
Redaktör: Åke Blomberg, Lidåkersgatan 6 C, 531 00 Lidköping

Telefon: 0510-286 42 (arb. 0510-221 30)

I redaktionen: Anita Lindblom, Franko Luin, Geoffrey Sutton
Prenumeration: 30 kronor per år, postgiro 20 12-3, Svenska Esperantoförbundet

Tidningen utkommer med 8 nr per år: i februari, mars, april, maj, september, oktober, november och december.

Manusstopp: den 10, månaden före utgivningsmånaden

Fotosats: Esperantoförbundet
Tryck: Sturetryckeriet, Stockholm 1977



Esperantoförbundet

Postadress: Fack, 122 04 Stockholm-Enskede

Besöksadress: Hägervägen 31

Telefon: 08-48 99 76

Förbundets expedition har öppet tisdagar kl. 18—20.

Postgiro: 20 12-3

Medlemsavgift: direktansluten medlem 30 kronor, ungdomsmedlem under 26 år 15 kronor, familjemedlem utan tidning 10 kronor

Prenumerationsavgift för *La Espero* och *Esperanton* ingår i medlemsavgiften.



Esperantoförlaget

Postadress: Fack, 200 42 Malmö
Besöksadress: Möllevångsgatan 20 B

Öppettider: 1 sept—15 maj: onsdagar kl. 10—11, torsdagar kl. 17—18

Skriftliga beställningar expedieras hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29

Postgiro: 578-5

Expedition: Anna-Greta Strönne

Medhjälpare: Wivi Nilsson

Styrelsens ordförande: Åke Blomberg

Unu el la plej parolataj lingvoj

En broŝuro/revuo kiun la bulgara turisma oficejo en Stockholm distribuas troviĝas ankaŭ informo pri la lingvo de Bulgario. Ni tradukas la koncernan pecon el la angla:

«*La oficiala lingvo de Popola Respubliko Bulgario estas la bulgara (kiu apartenas al la grupo de slavaj lingvoj). Tamen, tre multaj bulgaroj povas konversacii en aliaj lingvoj, el kiuj la ĉefaj estas la rusa, la angla, la germana, la franca, la itala kaj esperanto.*»

Tio prezentas favoran perspektivon al ĉiuj, kiuj jam povas plani sian venontjaran libertempon en la lando de la Universala Kongreso 1978 — en Varna.

Informo al rektaj membroj

Ĉi-apude vi povas trovi la informon, ke kotizo por rekta membro de SEF (t.e. por membro, kiu ne povas aliĝi al klubo, ĉar klubo ne ekzistas en lia aŭ ŝia loĝloko) estas 30 kronoj po jaro, por junulara membro 15 kronoj, por familia membro (sen gazeto) 10 kronoj.

La kasisto petas ĉiujn, kiuj ankoraŭ ne havis okazon sendi sian kotizon, baldaŭ fari tion.

Se ekzistas klubo en via loko aŭ proksime al ĝi, vi kompreneble aliĝu al ĝi kaj partoprenu al la kluba vivo.

Ilustrita librolisto

Kun peto pri mencio ni ricevis la novan libroliston de Dansk Esperanto-Forlag. Preskaŭ 70 eldonaĵoj troviĝas en la listo, kaj por ĉiu troviĝas krom la titolo kaj prezo ankaŭ mallonga priskribo de la enhavo. La listo estas havebla ĉe Dansk Esperanto-Forlag, Ingemannsvej 9, DK-8230 Aabyhøj, Danlando. Ĉiuj libroj estas aĉetebraj ĉe Eldona en Malmö.

Kaj denove limeriko

Ankoraŭfoje ni povas fini tiun ĉi rubrikon per limeriko, kies aŭtoro volas resti anonima. Jen ĝi:

*Estas juna vir' el Uppsala,
kiu igas ĉion skandala.
Forgesinte metrikon,
li verkis limerikon,
kiu sonas ege banala.*



Ekzistas loko por ĉiuj tendencoj

En la februara numero de esperanto, la oficiala organo de UEA, d-ro Denoel, estrarano de UEA, skribas pri «Pluralismo kaj unueco». Li konstatas ke «ĉiu kontinento, ĉiu grupo de nacioj, ĉiu el la 'tri' mondoj estas reprezentita per la landaj asocioj en la moderna UEA». Tion postulas la universaleco de la esperanto-movado: ni proponas la uzadon de nia komuna lingvo, ne al kelkaj elektitaj nacioj, sed al la loĝantoj de la tuta terĝlobo.

Tiu fakto kreis problemojn al UEA, kiu devas agi por la menciita celo, samtempe konservante sian neŭtralecon. «En la intenco pli rapide oficialigi la Internacian Lingvon en sia lando, kaj tiel kontribui al la ĝenerala oficialigo, pluraj diverstendencaj landaj asocioj staras sur la ideologiaj pozicioj de sia nacio, ĉefe tie, kie tiu ideologio profunde enradikiĝis en la nacia vivo».

Centra Laborrondo Esperanto, CLE, la landa asocio de Germana Demokratia Respubliko, estas ligita ne nur ideologie sed ankaŭ strukture al la ŝtata sed tamen oficiala kultura organizaĵo de la lando. Temas pri duobla ligiteco: al UEA kaj al la enlanda instanco. «Post preno de la necesaj garantioj, UEA konsideris, ke tiu duobla ligiĝo ne estas obstaklo al aliĝo (al UEA) de esperantistaro, kies oficiala statuso en ĝia lando cetere aspektas kiel pozitiva faktoro».

Mi plene konsentas kun d-ro Denoel. Jam pli frue ni akcentis en La Espero, ke la esperantistoj devas akcepti, ke diverstendencaj asocioj uzas nian lingvon kaj laboras inter ni. En la sporta mondo oni jam delonge akceptis, ke la ligiteco de iu asocio al la politika sistemo de la respektiva lando ne devas bari la kunlaboron en la sporta tereno. Ni esperantistoj devas fari la samon, se ni ne deziras eterne resti ekskluziva sekto sen ia influo al la lingva evoluo.

Åke Blomberg

Fine de januaro venis al Uppsala prof. dro Paul Ariste, profesoro pri finnugraj lingvoj ĉe la universitato de Tartu en Estonio, por prelegi dum du semajnoj ĉe la universitato. Profesoro Ariste estas monde konata en sia fako, membro de la Estona Akademio de Sciencoj, honora membro de la sciencaj akademioj de Finnlando kaj Hungario, ano de la redakta komitato de *La Monda Lingvo-Problemo* kaj membro de Akademio de Esperanto. Esperantistoj plurfoje renkontis lin dum lia vizito. kaj intervjuis lin por *La Espero*.

«Kiam vi lernis esperanton?»

«Mi estis 14-jara, kiam mi komencis. Mi havis esperantistajn konatojn pli aĝajn ol mi kaj tiel interesigis. Kiel 15-jara mi jam ĝin sufiĉe bone konis kaj kiel 16-jara mi skribis mian unuan lingvan skribaĵon en esperanto, kiu temis



«Ni devas havi tre multajn kaj tre fortajn personajn kontaktojn»




la organizaĵo estas tre forta. Estas multaj membroj, ili havas kursojn, programvesperojn, referaĵojn ktp. Tutlandan organizaĵon ni ne havas, sed lokajn. Kaj en aliaj respublikoj en Sovetunio estas same.»

«Ĉu ekzistas tutuniaj kontaktoj inter esperantistoj en Sovetunio?»

«Jes, ili estas tre fortaj. Ĉiusemere oni aranĝas tielnomatajn tendarojn en tre diversaj lokoj, sed ne samtempe. En kelkaj tendaroj estas ĝis 500 partoprenantoj, kaj tie oni havas sencajn prelegojn. Ĉiu tendaro havas sian specialan programtemon. La tendaro daŭras proksimume unu semajnon. Oni povus nomi ilin ankaŭ someraj universitatoj de esperanto.»

«Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn pri la nove komencita interlingvistika agado de la Soveta Akademio de Sciencoj?»



Fotis Ulla Luin

pri la liva popolo (*La livoj en Esperanto Triumfonta*, Kolonjo, 1921.)»

«Kaj ĉu vi mem aktivis en la esperanto-movado nun?»

«Mi foje estis sufiĉe aktiva, sed nun lastatempe malpli. Ankoraŭ antaŭ dek jaroj mi instruis ĝin en la universitato en Tartu. Multaj studentoj tiam ĝin lernis. Nun mi estas aktiva nur kiel ekzamenisto. Sed mi skribadas esperante por gazetoj kaj simile, kaj ankaŭ pri esperanto.»

«Ĉu vi povas diri, en kiuj universitatoj, mezaj aŭ elementaj lernejoj oni instruas esperanton en Sovetunio?»

«Mi kredas, ke neniuj elementaj lernejoj, sed en tre diversaj mezlernejoj, ekzemple en Tallinn estas la deka mezlernejo — ili estas laŭ numeroj ĉe ni — tie estas esperanto kiel fako. Oni povas legi ĝin kiel fremdan lingvon — kaj mi scias, ke en Riga oni ĝin instruas, ankaŭ en aliaj lernejoj en Latvio, kaj en diversaj aliaj partoj de Sovetunio. Sed plejparte ĝi estas nedevisa fremda lingvo. Oni aranĝas kursojn.»

«Ĉu en Tallinn ĝi estas deviga?»

«En kelkaj klasoj ĝi estas deviga, jes. Se oni eklernis, oni devas daŭrigi.»

Por instrui la lingvon oni nun devas ricevi oficialan atestilon pri kompetento kaj mi, kun du universitataj kolegoj,

faras ĉi tiujn ekzamenojn en la universitato.»

«Ĉu la ŝtato donas iom da ekstra salajro al homoj, kiuj scipovas esperanton?»

«Estas kelkaj tiaj profesioj, kie oni bezonas fremdan lingvon — kaj oni povas ricevi pli da salajro ĝis kono de tri lingvoj — por kvar aŭ kvin ne plu. Kaj unu el ili povas esti esperanto — en dogano, restoracioj, bibliotekoj ktp.»

«Sed ĉi tio verŝajne ne aparte allogas homojn lerni la Internacian Lingvon?»

«Ne, sed mi tamen scias, ke kelkaj venis al kursoj por havi esperanton kiel trian lingvon.»

«La estona eldonejo Eesti Raamat regule eldonas altkvalitajn librojn en esperanto. Ĉu vi scias pri la estonta agado de la eldonejo sur ĉi tiu kampo?»

«Jes, ĝi ankaŭ tiel daŭre eldonos en la estonteco. Ĉi-jare devas aperi sufiĉe dika libro de estona poezio. Estas ĉirkaŭ sesdek aŭtoroj tradukitaj de Hilda Dresen.»

«Ĉu vi povas diri kelkajn vortojn pri la organizo kaj konsisto de la esperanto-movado en Estonio?»

«En Estonio estas lokaj organizaĵoj. En Tartu estas klubo esperantista. Ĝi ne estas tre forta, sed oni aranĝas ankaŭ kursojn por urbanoj. En Tallinn

coj?»

«Ĝi estas sufiĉe forta, sed bedaŭrinde mortis profesoro Bokarev, la koro kaj la kapo de la tuta movado, sed oni daŭrigas tie. Oni invitis min antaŭ nelonge veturi tien por prelegi, kaj oni kunvenas regule tie kaj esploras la demandon pri lingvo internacia; ne nur esperanton, sed centre estas tamen esperanto.»

«Ĉu oni en antaŭvidebla estonteco povos fondi sovetan esperanto-organizaĵon?»

«Mi ne scias, ĉu oni organizos, sed tio dependas de financoj. Se la ŝtato havos financojn, oni faros tion.»

«Kiamaniere svedaj esperantistoj povas kunlabori konstruktive kun vi en Sovetunio?»


«Antaŭ ĉio oni devas havi tre multajn kaj fortajn personajn kontaktojn, kaj koni ĉion, kio aperas ĉe ni, same kiel ni volas konatigi kun ĉio, kio estas eldonita ĉe vi. Sed mi opinias, ke oni ankaŭ povas aranĝi somerajn ekskursojn: svedaj esperantistoj veturas ekzemple al Tallinn por renkonti kun tieaj esperantistoj.»

«Koran dankon!»

(Intervjuis Geoffrey Sutton. La demandojn ellaboris ankaŭ Tomas Jansson)



Två bilder från Falköping: ovan kvarnen, Lundahls Augusta, belägen på en mindre höjd i de centrala delarna av staden. Under hällkista vid Luttra, sydväst om Falköping. Det finns många liknande minnen från stenåldern. (Foto Inga Johansson)



Falköping-kongressen

Som du redan vet, kommer årets svenska esperantokongress att äga rum i Falköping under pingsthelgen. Programmet för kongressen kommer att publiceras i nästa nummer av *La Espero*, men redan nu kan vi ange några av de viktigaste programinslagen.


Själva kongressen startar på pingstafton kl. 14. Redan samma eftermiddag blir det diskussioner och föredrag.

Kvällen blir lite mindre ansträngande, eftersom det är tänkt att vi ska ha middag, som Falköping kommun bjuder deltagarna på, och lite underhållning.

På söndag förmiddag äger det egentligen viktigaste arrangemanget rum, nämligen Esperantoförbundets årsmöte. Det är tänkt att ta hela förmiddagen. Eftermiddagen är bokad för en längre utflykt runt Falbygden. Den kommer att avslutas i restaurangen Bredablick på Mösseberg, med en otrolig vy över Falköping.

Måndagen är bokad för några sammanträden till — vilka och när kommer det att stå i nästa *La Espero*.

Du hittar som bilaga i detta nummer ett inbetalningskort. Det använder du för att anmäla dig till kongressen och boka hotell. Avgifterna (190, 230, 270) inkluderar allt: två övernattningar, mat, kongressavgift, bussresa. Om du vill vara med på kongressen, men ordna logi och mat själv, betalar du bara 30 kronor som är kongressavgiften. Som medlem i SEJU har du 15 kronors rabatt.



UEA premias la svedajn esperantistojn per Trofeo Fyne. Ni premiu UEA per membreco en *Societo Zamenhof!*

Aldonu 170 skr al via kotizo por UEA.

Manpleno da libroj por junaj infanoj

Lernolibro por infanoj

Eldono de esperanta lernolibro por infanoj estas malofta okazaĵo. Ĉi-tiu *Esperanto por infanoj* de G. Gladstone Salomon aperis en 1975 en sia sesa eldono. La unuan fojon ĝi aperis en Aŭstralio en 1934. Oni bone povas konstati, ke la libro estas pli ol kvardekjara kurso. Kelkaj historioj estas eĉ iomete ekscitigaj. La libro esta pedagogie farita. Infano povas legi kaj kompreni la tekston kun helpo de la bildoj, kiuj plenigas la kontraŭan paĝon. La bildoj estas sufiĉe simplaj; kelkaj el ili estas interesaj kaj vivantaj, aliaj estas preskaŭ malbonaj. La teksto de la bildoj — do la teksto presita sur la bildpaĝoj — estas mane skribita kaj pro tio malpli bone legebla ol ordinaraj preslitoj.

La ĉefpersonoj de la libro estas la familianoj de sinjoro Muso. Estus pli bone se oni ne personigus bestojn kiel en tiu ĉi libro. La libro estus pli interesa, se, ekzemple, infanoj agus en la libro.

Post trastudo de la libro oni ekhavas sufiĉe grandan vortrezoron, pri ĉiutagaj vortoj, pri bestoj, monatoj, fruktoj ktp. Tra la tuta libro la vortoj estas skribitaj tiel, ke la sufiksoj estas signifitaj per streketo, ekz. «kat-id-o». La libro finiĝas per demandoj pri la diversaj historioj.

Mi opinias, ke la libro estas uzebla en grupo de infanoj sep- ĝis dekdu-jaraj. Estus interese, se vi, kiu jam provis aŭ iam provos la libron en infana kurso rakontos en *La Espero* kiel ĝi funkcias en la praktiko.

Kerstin Rohdin

Sep reĝidoj por infanoj



Al la plej belaj infanlibroj en esperanto apartenas la fabellibro *La sep reĝidoj* de Béla Balázs, kun ilustraĵoj de Adám Würtz. Ĝi aperis jam en 1970 en Budapeŝto, sed kiel ofte okazas kun infanli-

broj, ĝi restis nerecenzita.

La fabelo sekvas la klasikan modelon de infanfabeloj, kie la bono ĉiam venkas super la malbono. Bonaj estas en la fabelo la reĝo kaj la reĝino kaj, kompreneble, la sep reĝidoj, kiuj ĉiuj loĝas en karusela palaco. La malbonon reprezentas sorĉistino, kiel en multaj aliaj fabeloj. La fabelo ne estas speciale elstara, sed ĝi estas ĉarma. Tio kio plej allogas en la libro estas la vere belegaj tutpaĝaj koloraj ilustraĵoj de Adám Würtz. La libro estas 33 cm alta kaj 24 cm larĝa, do temas pri vere grandaj ilustraĵoj!

Kio iom malpli allogas estas la traduko. Ĝi estas tute glata kaj senriproĉa, sed ĝi ne estas por infanoj. La lingvo de ĝi estas tro malfacila, la frazoj tro komplikitaj; oni pensu, ke esperanto por infano estas nur fremda lingvo. La saman mankon havas, cetere, plejparto de la tradukitaj infanlibroj. Stile ili povas esti perloj, sed por infanoj tamen nelegeblaj.

Mi ne volas per tio malrekomendi la libron. Tute kontraŭe! Vi kiu legas tiun ĉi recenzon tute certe ne estas plu infano, kaj la lingvo en la libro tute ne kaŭzos problemojn al vi.

Franko Luin

Robert Fisker: Morso-klubo

La libro estas tradukita el la dana de Gudrun Riisberg. Ĝi entenas du streĉajn rakontetojn por infanoj 10 - 14 jaraj. La verkisto verkis tre multajn librojn por gejunuloj. La antaŭparolo mencias, ke li estas eminenta pedagogo en elementa lernejo kaj havas profundan scion kaj grandan sperton pri geknaboj.

La historio *Morso-klubo* temas pri kelkaj knaboj, kiuj lernas morso-alfabeton. Kiam unu el la knaboj estas sola iun vesperon venas ŝtelistoj kaj oni povas legi pri la ekscitaj okazaĵoj post la malkovro de la ŝtelistoj.


La alia historieto, *Trezoro-serĉado*, indikas jam per sia titolo ke temas pri okazaĵoj, kiuj estas interesaj por geknaboj.

La lingvo estas klara kaj bona. Oni kapablas legi la librojn post du- aŭ trimesetra studado de esperanto. Speciale en la unua historio oni trovas teknikajn terminojn kaj la verkisto uzas plurfoje la samajn vortojn, por ke la leganto bone lernu ilin.

Mi opinias, ke la libro estas uzebla, eĉ uzinda en studgrupo por gejunuloj; eble en iu lerneja grupo.

La akompanajn desegnaĵojn faris Ingeborg Strange-Friis kaj Hans Jørgen Brøndum.

Kerstin Rohdin



Ĉarma urseto en bona traduko

Jam kelkajn jarojn troviĝas ĉe la libroservoj esperanta traduko de «Winnie-the-Pooh», svede «Nalle Pu». La esperanta titolo estas preskaŭ sintezo de la angla kaj sveda titoloj: *Winnie-la-Pu*.

La libro estas en si mem tiel konata, ke ĝi ne bezonas prezenton. Ĝi temas pri urseto Winnie kaj liaj amikoj. Winnie eble ne estas la plej inteligenta urseto de la mondo, sed li kapablas pensi, li ankaŭ kapablas kanti kaj li tre volonte zumadas.

La libro estas verkita antaŭ pli ol 50 jaroj (jubileo pasintjare), sed ĝi daŭre restas freŝa kaj amuza. La traduko estas flua kaj facila, kaj mi trovis ĝin preskaŭ ideala libro por daŭriga kurso: la vortoj kaj tutaj frazoj ofte ripetiga, tiel ke oni povas lerni ilin kaj memori.



La libro aperis en Usono, eldonita de la eldonejo, kiu ankaŭ eldonis la originan anglalingvan eldonon. Ĝi estas ilustrita per la originaj ilustraĵoj, laŭ kiuj la urseto Winnie estas mondkonata.

Franko Luin

NYA BOKFÖRSLAG

VENTOJ

modern prisbelönt jugoslavisk roman av Blagoje Ivanov, översatt av Josip Velebit.

Vojdan, romanens huvudperson, drar sig tillbaka till ensamhet i bergen för att komma till klarhet om sig själv och sitt förhållande till medmänniskorna... **Pris 19 skr**

FORKAPTITA

R L Stevensons välkända äventyrsroman från Skottland på 1700-talet. Översatt av A. Goodheir. **Pris 30:50**

KALEVIPOEG

delar av det stora estniska eposet om Kalevipoeg, hjälten i gamla estniska folksagor. Översatt av Hilda Dresen, illustrerad av O. Kallis

Pris 12 skr

Esperantoförlaget

UK 77

Island

Kongress-avgifter

(Gäller till 31 mars 1977)

Upplysningar hos s-ino Ester Andrén,
Regementsgatan 27 d, 217 53 Malmö

1. Icke medlem i UEA	310 skr
2. Medlem med årsbok	276 skr
3. Medlem med årsbok och «esperanto»	225 skr
4. Make/maka till (1)	218 skr
5. Make/maka till (2) eller (3)	194 skr
6. Ungdom t o m 20 år	94 skr
7. Universitetsstuderande t o m 30 år	155 skr
8. Synskadad	125 skr

Kelkaj raportetoj pri kluba agado

Diskuto pri argumentado

La Folio, organo de la klubo de Malmö, regule aperas kaj rakontas pri kunvenoj kaj kursoj. Por la 9-a de marto oni planis kunvenon, kie oni diskutis kiamaniere argumenti por esperanto.

Ofte okazas, skribas *La Folio*, ke eksteraj personoj, ankaŭ geamikoj, demandas pri esperanto, kaj tiam oni devas havi bonan respondon kaj bonajn argumentojn. La ideo meritas atenton ankaŭ en aliaj kluboj.

Nova bulteno en Gotenburgo

En Gotenburgo aperas jam de longe *Mundo*, interesa periodaĵo de Oskar Svantesson. Nun la Esperantosocieto komencis eldoni *Spektro* kaj ni ricevis ĝis nun unu provnumeron, kun tre varia enhavo: informoj pri kunvenoj, poemoj de Jim Hornö, lingvaj problemoj ktp. Ĝi ne konkurencas kun *Mundo*; male, oni eĉ kunlaboras per la poŝta ekspedo.

La 20-an de februaro la Esperantosocieto de Gotenburgo aranĝis vesperon pri Islando, kiun partoprenis 70 — 80 ĉeestantoj. Islandon prezentis sinjoro Samuelsson de la loka oficejo de Loftleidir.

Nova klubo jam ekspanzias

Klubo esperantista de Tyresö plivastigis la agadsferon al la najbara komunumo Haninge. Dum marto, aprilo kaj majo ĝi montros ekspozicion pri esperanto en tri diversaj bibliotekoj. La temo estas: ekzistas esperantoklubo norde de Haninge (en Tyresö) kaj sude de ĝi (en Nynäshamn). Kial ne havi klubon ankaŭ en Haninge.

Oni ne esperas pri granda rezulto. La ekspozicio nur celas vekti atenton en lokoj, kie ankorau ne ekzistas loka agado.

Tyresö har en.
Nynäshamn har en.
Dags för Haninge?

Att få sin egen
esperantoförening.

Tradukaj ekzercoj

En *Esto*, la komuna organo de la organizaĵoj en la ĉefurbo, ni trovas i a, ke oni en unu grupo komencis traduki la konatan infanlibron de Astrid Lindgren, *Emil en Lönneberga*. Ĉu manuskripto por estonta esperanta eldono?

Konstrui per

YTONG®

estas konstrui

ekonomie

brulsekure



YTONG AB

YXHULT
GRUPPEN

Danĝera vivo de nervema hundo

La plej grava vivokupo de la hundo estas dormado. Ĝi bezonas dormi por reakiri la fortojn por leviĝi, fortojn por manĝi plurfoje tage. Normala nervema hundo bezonas proksimume 24 horojn da ripozo po tago.

Kelkfoje oni aŭdas pri okazoj kiam iu hundposedanto devigis sian hundon esti veka dum pluraj sinsekvaj horoj. Oni ne rajtas postuli tiom de hundo. Teni la okulojn malfermitaj tiom da tempo povas serioze danĝerigi la emocian sanon de la hundo: ĝi povas enuiĝi. Baldaŭ ĝi havos kompletan nervkolapson: plej verŝajne sur via lito.

Tiuj, kiuj vere zorgas pri siaj hundoj, atentas ke ili estu komfortaj. En la tagĉambroj tio povas ne esti facila, ĉar la modernaj mebloj ne estas desegnitaj por hundoj. La modernaj seĝoj



estas komfortaj por la homoj por sidi sur ili, sed plej multaj hundoj preferas kuŝi sur ili; la tabloj estas plej ofte konstruitaj kun krima malzorgo pri la natura komforto de la hunda korpo.

La sola meblo, kiu plej komplete ŝajnas taŭgi al la eterna hunda serĉado de konvena dormangulo, estas la lito.

POR FINI

La hundo opinias, ke la lito estas mirinda malkovro, eble la plej perfekta, kaj certe la plej utila, kiun la homoj iam faris.

La lito permesas al la hundo streiĝi en kiun ajn direkton kaj libere ŝanĝi sian pozicion; en la tago ĝi povas trovi la plej sunan parton. Se la temperaturo estas malpli ol bezonate, estas eble jeta la litkovrilon sur la

plankon kaj iri sub la littukon. Ĝi estas pura, malsimile al la tapiŝo, kie la homoj iras tagon post tago en siaj ŝuoj aŭ, eĉ pli malbone, en la vesperoj sen ili. Kutime kuŝas kusenoj sur la lito, sufiĉe malpezaj por esti portataj al la bezonata loko.

Dum plejparto de la tago la hundo povas trovi pacon en la dormoĉambro; ĝi povas senĝe-


ne dormi en ĝi. En la kuirejo iu povas iri sur li aŭ li povas iri sur ies piedoj. En la tagĉambro iu povas sidigi sur ĝin, kiam ĝi ripozas en la sofo. Sed en la dormoĉambro ĝi povas havi la eblecon ne esti ĝenata de tiuj, kun kiuj ĝi devas dividi la domon.



Kiel meblo la lito havas nur unu malavantaĝon al hundo: ankaŭ la homo opinias, ke li devas dormi en ĝi. La hundoj ofte abrupte vekigas de sia tagmeza siesto iam je la dek unua nokte, kiam la mastro montriĝas en sia pijamo kaj postulas lokon por si. Tiam komenciĝas batalo, kiu kelkfoje daŭras longe en la nokto, kelkfoje ĝis la mateno.

La hundoj opinias, ke homoj estas strangaj dormkamaradoj. Ili piedbatas kaj turniĝadas en la dormo kaj vekigas en la mateno ankoraŭ pli lacaj. Dum la nokto ili grumbblas vortojn eĉ pli nekomprenablajn ol tiuj, kiujn ili uzas, kiam ili estas vekaj.


Stephen Baker
(Tradukis M*)



Jag ska klåpåda att klariga med några exempel så att ni mem kan konstata att det är sant som jag dirar. Det gör föga util att stariga fondascher och hålla på med ändlösa utredningar när alla konar att folk i allmänhet maltror att vårt språk är parolbart. Och av goda kialer: helt därför att de aŭdar det inte på våra kunvener. Om bara varje unuopel samidean ville göra till sin grandaste stråvan att lärna esperanto ordentligt, så tror jag att sådana miskoncepter rapidigt skulle försvinna — pli aŭ malpli. Se på mig, till exemple.

För tri jar sedan kunde jag inte dira muldet mer än «Saluton» och «Kiel vi fartas?». Jag var alldeles nöjd med denna grado av kunskap — oprofund som den var — det var tillräckligt för att subtenera min hobby att intersjandja glumärken, och för att beställa de plej sista esperantotidningsnumrorna och naturligtvis sprida ut brošurer. Och till och med, jes samideaner, till och med när jag starade inför uppgiften att spela in ett sonband, så brukade jag skriva ut min texto för hand och lega upp den i mikrofonen, ord post ord.

Gevänner!



Så en tago, när jag tittade i min Plena Ilustrita Vortaro, så ekupptäckte jag en novsanning om esperanto, som borde ha starat klara för mi från början, nämligen att esperanto fakte är ett språk och att oni kan säga tjion på det, till exemple «Snyt dig» eller «Kan du låna mig en deka till i morgaŭ?», i stället för bara saker om rörelsen som «Rimärker du att jag havar en grön stela på mantelon?». Jes, från den dagen, från dagen djis nunförtempen har jag bara tänkt på esperanto. Esperebelt har min pensförmåga plibättrats mycket.

Nåja, några vänner har sagt mig att de havit litet ... låt oss säga malfaciliteter att kämprena min svedska. Bara nonsens. Fakte, en dag gick jag till min barbisto och sade: «Trantja det bara litet på flankorna». Naturligtvis glömde jag mig — det kan hända vem som helst. Hur som helst så var han stockholmbarbist och skinade att förstå, med alla de fremdare som var i Stockholm de tagarna. Men det gravar inte. Det vill säga, det skulle t o m vara en god varbmetod.

*Adaptita al la sveda de ULu
laŭ ideo de Ken Miner*